

# La Movado

Fondita en 1951 N-ro 679 sep. 2007

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ  
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu, 561-0802

KJUŜUA ESPERANTO-LIGO  
Kutii 1597-1, Yamato-tyô, Saga-ken, 840-0202

ESPERANTO-LIGO de TYÛGOKU kaj SIKOKU  
Ogongzan-tyô 7-15, Minami-ku, Hirosima-si, 734-0041

## ENHAVO

Movade, gazete, kongrese.....	Redakcio	1
Pri la kanto "Korderizo" .....	Osioka Moritaka	2
Kordeziro .....	trad. Konisi Gaku	3
Hajkoj: 17 sezonoj.....	Hiroataka Masaaki	4
La nefinlegebla Dante.....	Simizu Yûko	5
Fluo.....	Akira	6
Mezaĝulo el kaverno .....	Kaba Toyohiko	7
Sinmortigo kaj la japana socio ...	Yamaguti Sin'iti	8
Jokohama UK por mi .....	Nakatu Masanori	9
Kiel aĉeti .....	Kataoka Tadasi	10
Piktogramoj en japania mapo.....	Aikawa Setuko	11
Kyôgen: Fungoj .....	trad. Simatani Takesi	12
Kvin tankaŝoj.....	Huĝimoto Tacuo	13
Pri la eldona aktivado de KLEG.....		14
Enigmo(1)..... 9/Enigmo(2)..... 15/Enigmo(3)...		16

Por la 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo

## Movade, gazete, kongrese


Ĉi tiun numeron de "La Movado" ricevas ne nur ĝiaj regulaj legantoj, sed ankaŭ ĉiuj partoprenantoj de la UK en Jokohamo, kaj ni parolas iom pri nia gazeto.

"La Movado" estis lanĉita en aprilo, 1951, kiel monata organo de la ĵus fondita Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), kaj poste fariĝis komuna por la ligoj en la okcidenta Japanio, kiel vi vidas supre. Ni konstante kaj akurate eldonadas ĝin dum 56 jaroj, kaj la nuna numero atingas 679!

Estas tamen nia kutimo redakti ĝin dulingve, en la japana kaj Esperanto, kaj la japana okupas plej multajn paĝojn en ĉiu numero, kaj multaj el la enhavo temas pri nia agado, informado, lernado, ekzercado kaj tiel plu. Kaj la gazeto estas antaŭ ĉio por la movado, kiel montras la titolo.

Ĉi tiun numeron ni tamen decidis redakti tute

en Esperanto kaj petis niajn membrojn kontribui eseojn pri sia temo. Kaj vi vidas la rezulton. Vi legos diversajn kaj variajn pensojn, opiniojn, raportojn de japanaj esperantistoj pri la nuntempa socio.



Ni invitas vin sendi vian opinion al ni, por ke niaj legantoj sciu opiniojn ankaŭ de homoj en aliaj kulturoj. Tia interŝanĝado certe estas esenca celo de nia movado, ni pensas.

Bv. noti, ke por esprimi nian gratulon al la kongreso ni ornamas ĉi tiun numeron per koloraj bildoj, dum la regulaj aperas modestaj nur per nigra inko.

La bildo montras la parton de la havena kvartalo de Jokohamo, kie okazos la UK. Lignogravuraĵo de s-ano *Takehana To*, unu el ia plej fruaj membroj de KLEG.